

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Aŭgusto 2016

(48a jaro)

N-ro 172

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ





La kongresa poŝtmarko



La unuataĝa koverto

Detaloj pri la poŝtmarko

Temo: 101a Universala Esperanto-Kongreso

Eldona numero: (Slovakio) POFIS 617

Dato: 23.07.2016

Nominalo: 1.20 €

Bildo: Vizaĝoj kaj sagoj montras reciprokan komunikadon

Aŭtoro: Doc. akad. mal. Igor Benca (Nitra, Slovakio)

Mezuro: 44,1 x 26,5 mm 50 pm en folio Ofseta preso

Presita en Poŝta Presejo Praha

Eldonkvanto: 300 000

Fonto:

<http://www.pofis.sk/en/catalog/products/postage-stamp-2016-101st-world-congress-of-esperanto>

Detaloj pri la Unuataga koverta

Eldona numero: POFIS FDC 617

Dato: 23. 07. 2016

Vendoprez: 2.10 €

Presejo: Kasico, Bratislava, Slovakio

Pres-teknologio: Ofseto

Eldonkvanto: 3100

Aŭtoro: D-co akad. mal. Igor Benca

Foto: S-ro Benca



Fonto:

<http://www.pofis.sk/en/catalog/products/postage-fdc-2016-101st-world-congress-of-esperanto>

La poŝtaj stampoj



(A) POFIS PPP 35/16



(B) POFIS PPP 36/16



(C) POFIS PPP 37/16



(D) UTK-stampo

POFIS: Filatela katalogo en Slovakio

A B C: Mezuro: 29x29

La stampiloj funkciis en la poŝtejo Nitra 1

D: La stampo troveblas nur sur UTK (FDC)
Mezuro: 21x25, surpresita

Tutaĵo-poŝtkarto por filatela ekspozicio okaze de la 101a UK



Eldonita: 23. 07. 2016

Teksto: ESPERANTO SUR POŝTMARKOJ KAJ BILDKARTOJ
(en la slovaka kaj en Esperanto)

Bildo: Kun vizaĝoj el la poŝtmarko

Nominalo: 0,55 €

Eldonkvanto: 2000 ekz.

Aŭtoro: J. Benca


POFIS-katalogo: 255 CDV 243/16

Akompanis ĝin poŝta memorstampo

Alvenis 04. 08. 2016

La ekspozicio okazis 26-29.7.2016 en teatro Andrej Bagar en Nitra
fare de Filatelista Klubo Nitra

Fonto: <http://www.postoveznamky.sk/eroffnungszeremonie-die-ausstellung-esperanto-auf-briefmarken-und-postkarten>



Pošta memorfolio por la 101a UK

Aŭtoro: J. Benca

Eldonita 23. 7. 2016

Eldonkvanto: 1800 ekz.

POFIS-katalogo: 056 PaL 617/166

Filatela ekspozicio „Esperanto kaj Slovakio sur pm kaj bildkartoj“ kadre de la 101a UK - 26.7 - 29. 7. 2016




La invitilo (Fone videblas diafane E-pm-oj)



Foto el retpaĝo de Asocio de Slovakiaj Filatelistoj: Malfermo de la ekspozicio
(Foto: MVDr. Milan Šajgalik)

La solena malfermo okazis 26.7.16 je la 17a horo en la Teatro Nitra.
Ĉeestis i.a. Ing. Ondrašek kaj d-ro Janka Švecova de la Ministerio de Trafiko,
Magistro Anton Števko, direktoro de Muzeo Nitra,
Miroslav Naršik, prezidanto de Asocio de Slovakiaj Filatelistoj,
Doc. Igor Benca, aŭtoro de la kongresaj filatelaĵoj, (dekstre)
Peter Balasz, prezidanto de SKEF kaj de la LKK, (maldekstre)
kaj Elda Doerfler, prezidantino de ELF/AREK.
Videblis kolektoj de 17 ekspozantoj el Italio, Slovakio, Ĉeĥio, Serbio, Germanio.
Pri la ekspozicio raportis la kongresa kuriero PRIBINA n-ro 6.
Preparis la ekspozicion s-ano Peter Holba kun la helpo de la loka filatelista klubo
kaj de Asocio de Slovakiaj Filatelistoj .



En la UK haveblis, apud filatelaĵoj, ankaŭ kongresaj bildkartoj. Vidu supre du kaj la adresflankon kun stampita poŝtmarko. Krome troviĝas sur ĝi kongresa memglua glumarko kaj dekstre de ĝi kongresa verda stampo. Sendis ĝin nia prezidantino. Dankon!

Karaj Elf-Arek-anoj!

Entuziasma revenis via prezidanto de la 101a UK, okazinta en Nitro, Slovakio (23-30 julio). Nu, certe vi pensos: kiel kutime, ĉiu ajn rehejmiĝas post E-kongreso entuziasmoplena, ideoriĉa, kun tute verdaj koro kaj menso. Sed ĉifoje – kredis min! – ni esperantistoj-filatelistoj havis pli ol unu kialon por esti kontentaj, eĉ kontentegaj!

Sabaton la 23an, areto da triestanoj prezentis nian Ligon dum la Movada Foiro.

Svarmis antaŭ nia tableto aro da kongresanoj, el kiuj pluraj prenis varbilojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn je dispono senpagajn kaj la propagandilojn de ENA – Esperanto-Numismatika Asocio, kun kiu Elf-Arek amike kunlaboras.

Aliris nian diskonigejon ankaŭ la ligoj, ĉeestantaj la UK-on.

Mardon la 26an, okazis de la 11a ĝis la 12,30 h Elf-Arek-kunveno, malfermata al membroj kaj ĉiuj interesiĝantoj. Eniris la salonon trideko da personoj. Mi estis envere agrable surprizita, pro la kvanto da ĉeestantoj. La komenco de mia prezento bedaŭrinde estis prokrastita de la nebona funkciado de la komputiloj, afero tre grava ĉar mi estis preparinta tri projekciadojn surekranajn, nome “Prezento de Elf-Arek”, “Historiaj bildoj pri L. L. Zamenhof” kaj “Vojaĝo en la tempo per poŝtkartoj kaj glumarkoj”. Atendante la solvon de tiu tre embarasa situacio, mi klopodis teni alta la intereson de la publiko per klarigo de la agado kaj funkcioj de nia Ligo. Feliĉe, kiam mi jam estis senespera kaj preta “ĵeti la viŝtukon”, sur la ekrano ekaperis la unua projekciaĵo. Mi plivigliĝis kaj seninterrompe prelegis pri filatelaĵoj, kartoj, stampoj, glumarkoj ktp ktp. Nur unu persono foriris dum mia prezentado, tiu estis Mag. Bernhard Tuidar, teamestro kaj bibliotekisto en la Viena Muzeo pri kolekto por planlingvoj kaj Esperanto-muzeo, pro baldaŭa komenciĝo de sia prelego. Post prezentado ekestis kelkaj opini-interŝanĝoj, sinprezentoj kaj aliaĵoj. El tio sekvis la aliĝo de du personoj, kiujn mi varme bonvenigas en niaj vicoj: la konata esperantisto Franz-Georg Rössler (Germanio) kaj KANG Hongu, vicprezidanto de la Korea E-Asocio.

Entute, bonega kaj fruktodona sperto, nepre reorganizenda dum la ontaj UK.

En la sama tago, je la 17a horo, inaŭguriĝis en la unuaetaĝa halo de la Nitra Teatro ekspozicio pri E-filatelaĵoj kaj malnovaj pk. Ĉeestis Ing. Ondrášek kaj Dr. Janka Švecová - Ministerio de Trafiko, Mgr. Anton Števko - direktoro de Muzeo Nitra, Peter Baláž - prezidanto de SKEF kaj LKK, Miroslav Ľaršik - prezidanto de Asocio de slovakaj filatelistoj kaj Doc. Igor Benca - aŭtoro de poŝtmarko kaj filatelaĵoj. Ĉe la malfermo ĉiuj aŭtoritatuloj mallonge parolis kaj ankaŭ mi aldiris miajn dankojn nome de la filatelistaj esperantistoj.

Per tiu ekspozicio oni intencis propagandi Esperanton al civitanoj de Nitra kaj prezenti Slovakion al partoprenantoj de UK.

Sed kio estis tre grava kaj interesa por ni filatelistoj dum la 101a UK? La apero de poŝtmarko, de tutaĵo, de du diversdataj stampoj pri la kongreso kaj unu pri la ekspozicio, de memorfolio! Mi kredas, ke neniam estis emisiita tiom da priesperantaj filatelaĵoj dum iu ajn UK. Nitro superis eĉ Pekinon, 2004!

Gratulojn al la organizantoj!!! Kaj filatelistajn dankojn!!!

Al vi miajn plej elkorajn salutojn Elda Doerfler



**Ekspozicio
Filatelo kaj Esperanto
(16 julio - 9a septembro)
en la Poŝta kaj Telegrafa
Muzeo en Mezeŭropo
de Triest**

En la sunoplena tago de la 16a de Junio 2016 je la 11a horo kvindeko da personoj, esperantistaj, filatelistaj kaj aliaj, sekvis la enkondukajn vortojn de la malfermo. La muzea direktorino d-ro Chiara Simon eldiris unuajn bonvenigajn vortojn. En mallonga prezento ŝi esprimis sian miron pri la granda kvanto da filatela materialo rilata al Esperanto kaj ankaŭ kiom da scioj ŝi ricevis pri la lingvo mem dum la komuna preparado kaj muntado de la 15 paneloj.

S-ino Chiara Simon substrekis i. a. la fakton, ke unuafoje en sia muzea kariero ŝi prezentas al la publiko eksponaĵon de filatelistino. Strangas, sed tio veras, ĉar pli ofte estas viroj kiuj ŝatokupiĝas pri filatelo.

Post ŝi parolis la TEA-prezidanto, Edvige Tantin, kiu atentigis pri la interesa ligo inter la Triesta poŝta institucio kaj Esperanta asocio:

La fondinto kaj unua prezidanto de T E A estis d-ro Arturo GHEZ, deĵorinta kiel poŝta oficisto dum la Aŭstra-Hungara Imperio.

Vortumis poste s-ro Boris Di Constanzo, veninta el Rijeka kun grupeto da esperantistoj. Sekvis kun dankaj esprimoj pro la donita ebleco prezenti Esperanton en tiel prestiĝa loko nia prezidantino Elda Doerfler. Ŝi poste kun klarigoj gvidis la vizitantojn tra la ekspozicio.

Gratulon al nia ELF-AREK prezidantino Elda Doerfler, kaj al la prezidantino de TEA Edvige Tantin.





La malfermo de la ekspozicio kun Ch. Simon, E. Doerfler kaj E. Tantin

Invitilo

Posteitaliane



**La Filatelia
nell'Esperanto**

A 110 anni dalla nascita della
Associazione Esperantista Triestina

al Museo
Postale e Telegrafico della Mitteleuropa
piazza Vittorio Veneto, 1
Trieste

**Giovedì 16 giugno 2016
alle ore 11**

Inaugurazione della mostra
tratta dalla collezione di
Elda Doerfler

La Sua presenza sarà particolarmente gradita



Memor-poŝtkarto de la ekspozicia malfermo



Sur ĝi du bildoj de la Centra Poŝtejo Triesta:

maldekstre foto farita en la jaro 1906 kaj dekstre foto en la jaro 2015



La poŝta memorstampo



Poŝte sendita memorkoverta de la ekspozicio, eldonita de la Poŝta Muzeo
(Fortondita la dekstra duono de la koverta kun adreso)



Nia kluba amiko Haruja Maekaŭa
ĉi-jare denove prizorgis E-filatelaĵojn

i. a. por la 64a kongreso de Esperantistoj
en Kansajo.

Aperis poŝta memora datstampo kun la
dato 28. 6. 18 (18.VI.16), diametro: 32 mm
uzita de poŝtejo en SAKAI, (regiono Osaka),
memorkoverta, memor-pk kaj
serio da ind. pm-oj.

Dankon al li pro la senditaj materialoj,
kiujn ni povas montri al vi!



Kongresa memorkoverta kun la kongresa poŝta stampo kaj ind. E-pm-oj
sendita de nia kluba amiko Ziro Suzuoki

La Kansajaj ind. Esperanto-poŝtmarkoj (2016)

Okaze de la 64a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo (18-19 Junio 2016)
aperis serio de tri sambildaj E-poŝtmarkoj:



Nominalo: 82 enoj
dentumita, memglua
blua kadro, sur blanka fono - kongresa emblemo
(kvinpinta homa figuro en verda rondo)
nigra prikongresa teksto
sube ankaŭ en la japana
Sube: NIPPON kaj 82 (enoj)
Mezuro: 32x38



Nominalo: 52 enoj
dentumita, memglua
En flava kadro
sur blanka fono kongresa emblemo
(kvinpinta homa figuro en verda rondo)
nigra rondforma prikongresa teksto
sube ankaŭ en la japana
Sube: NIPPON kaj 52 (enoj)
Mezuro: 32x38



Nominalo: 82 enoj
dentumita, memglua
En flava kadro
sur blanka fono kongresa emblemo
(kvinpinta homa figuro en verda rondo)
kun nigra prikongresa teksto.
sube ankaŭ en la japana
Sube: NIPPON kaj 82 (enoj)
Mezuro: 40x47

Folio kun 10 ipm 82enaj (Sakura PH 21)





Folio kun 5 52-enaj kaj 5 82-enaj pm-oj



Folio kun 20 52-enaj pm-oj




Folio kun 10 grandaj 82-enaj pm-oj



Folio kun 20 82-enaj pm-oj

Verdaj Amikaj Tagoj en Senta 2016



Memorkoverta poŝte sendita

La poŝta memorstampo



La jam tradicia manifestacio
Verdaj Amikaj Tagoj de la E-klubo
en Senta ĉi-jare estis dediĉita al la evento
800 jaroj urbo Zyntharew (Senta).
24an de Junio en la ejo de la E-klubo okazis
E-filatela ekspozicio kun prelegoj de Imre
BELEC kaj LASLO Kavai.
24.06.2016 en la loka poŝtejo funkciis
poŝta memora stampilo
kun diametro de 35 mm. La teksto en ĝi:
VERDAJ AMIKAJ TAGOJ
800 JAROJN DE ZYNTHAREW

La portreto montras la hungaran reĝon ENDRE II (Andreo la 2a)
25an de Junio sekvis antaŭtagmeze prelego pri la jubilea urbo
en Esperanto, serbokroate kaj hungare
fare de Ilona KAJARI, Aranka LASLO kaj Petar TERZIC.

Informis: Imre BELEC. Ni dankas al li!



Julian Tuwim



W. Drees



„Onklo“ HO

Esperantisto sur monero: Otto DIX

Eldondato: Novembro 2016, okaze de lia 125a naskiĝtago

Eldonlando: Germanio

Nominalo: 20 €, arĝento 925/1000, diametro: 32,5 mm

Informis: H. Jankowski





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto:

ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



Gert Drucker, Brazilo Deziras interŝanĝi stampojn

„Mi havas filatelan E-kolekton kaj plurajn duoblajn E-stampojn, ne nur brazilajn, sed ankaŭ de aliaj landoj. Ĉu eble iu deziras interŝanĝi?“

Gert DRUCKER

Rua 13 de Maio 219/903

80 020-270 CURITIBA - PR

BRAZILIO



Bonvolu viziti nian ELF-AREK retpaĝon

<http://www.kolektado.esperanto.cc/>